

エスペラントは心の国境を消すことばです

*Organo de Hokkajda Esperanto-Ligo*

# Heroldo de HEL

N-ro 173

Septembro 2017

HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO

北海道エスペラント連盟

[Enhavo/目次]

- ・表紙、Enhavo/目次 P. 1
  - ・ La 102-a UK en Seulo/第 102 回世界 E.大会(ソウル) P.2  
/ Hirojuki JOKOJAMA/横山裕之
  - ・ La 90-a Kongreso de SAT /第 90 回 SAT 大会(ソウル) P.11  
/ Hirojuki JOKOJAMA/横山裕之
  - ・ La 102a UK kaj la 90a SAT-Kongreso en Seulo P.13  
/ Sawaya Yûiti
  - ・ 第 81 回北海道エスペラント大会 一般公開番組 P.19  
講演：「Minoritataj lingvoj kaj minoritatoj kaj mi  
少数言語と少数民族と私
  - ・ Danke ricevitaj (星田淳扱い読みたい方はご連絡ください) P.21
  - ・ 2017 エルプラまつり参加報告/後藤純子 P.22
  - ・ Protokolo de la 5-a Komitata Kunsido de HEL/Kasjaro 2017/ P.23  
2017年度 第5回北海道エスペラント連盟委員会 議事録
  - ・ [編集後記/Redaktanto parolas ..... ] P.24
-

## La 102-a UK en Seulo/第102回世界エスペラント大会(ソウル)


Hirojuki JOKOJAMA/横山裕之



### Antaŭ la kongresejo de la 102-a Universala Kongreso de Esperanto 第102回世界エスペラント大会の会場前で


De la 22-a ĝis la 27-a de julio 2017 okazis la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj (HUFS) en la urbo Seulo. Aliĝis 1173 homoj el 62 landoj. 186 homoj partprenis el Japanio.

2017年7月22日から29日まで、韓国ソウル市の韓国外国語大学で第102回世界エスペラント大会が開催されました。62カ国から1173名の参加申し込みがありました。日本からは186名の参加がありました。



会場前の沿道には、最寄りのフェギ地下鉄駅近くから、会場の大学までの相当長い距離に渡って、第102回世界エスペラント大会のロゴの入った歓迎のバナーが、街路灯に飾られていました。

参加者には「T-money」というお金をチャージして、地下鉄やコンビニなどで使えるICカードが配られました。ソウル市からの予算で配布したそうです。




### **Internacia Pontkunveno por Unuiĝo de Korea Duoninsulo** **朝鮮半島の統一のための国際架け橋会議**

28 日に開催されました。日本からは、田平さんの代わりに札幌市在住の宮沢さんが参加しました。第1回目の会議は、写真のように韓国外国語大学内で実施されましたが、第2回目の会議は国会ビルまで参加者はバスで行って、通訳も付けてエスペラントを公式言語として会議を行ったそうです。

Duona tago estas dediĉita al la UK en Seulo, kiu antaŭeniras laŭplane kaj senprobleme, malgraŭ lastatempaj politikaj streĉoj en la regiono. Aldone al riĉa kongresa programo, la "pontkunveno" de diverslandaj esperantistoj diskutos en la parlamentejo pri la reuniĝo de la korea duoninsulo. (El Gazetaraj Komunikoj de UEA)

最近の政治的緊張にも関わらず、計画通りに何の問題もなく前進しているソウルでの世界エスペラント大会(UK)に半島の日が充てられました。加えて、内容の豊かな大会プログラム、すなわち「橋渡し会議」に、色々なエスペランチストが朝鮮半島の統一について国会で議論をします。(UEA のプレスリリースから)



Prelego: La naskiĝo de Hangulo kaj la intelekta revolucio


講演: ハングルの誕生と知的革命

28日(金)15:30 から、韓国語の専門家で言語学者の明治学院大学の野間秀樹教授からエスペラントによる講演がありました。野間教授は韓国語の興味深い色々な著作を出題しています。『ハングルの誕生』という新書は面白かったです。札幌でも数か月前に日本語で似たような講演がありましたが、エスペラントでも講演するとは思わなかったので、驚きました。東北大学のエスペラントテストである後藤孝教授の監修があったようです。

Kongrese libro (大会プログラム)には、この講演の説明の冒頭に以下のようなことが書かれていました。

Kiam nova skribo naskiĝas, kion ĝi sekve aoportas al la koncerna socio? Kiel la "skriba lingvo" evoluas? Kiel la homa intelekto transformiĝas? Kaj kiel ĉio tio influas la homan vivon?

新しい表記体系が生まれる時、続けて関係する社会に何をもたらすだろうか? 「書き言葉」がどのように発展するだろうか? 人間の知性はどのように変わるだろうか? そしてこのすべてのことが人間の生活にどのように影響するだろうか?



## Hun Min Gong Um


### 訓民正音

訓民正音(くんみんせいおん、훈민정음)とは、「民を教える正しい音」という意味で、李氏朝鮮第4代王の世宗が15世紀に制定した文字体系ハングルの古称、あるいはそれについて解説した書物のことです。世宗は、多くの民衆たちが漢字を学び使うことができず、意志の伝達が難しく、犯罪裁判などで不公平な待遇を受けることなどの状況を打開するために、朝鮮固有の文字の創製を積極的に推し進めました。

大会プログラムには、以下のように書かれています。

"Hun Min Gong Um" ad Hangeulo, kreita en la korea lingvosfero de la 15-a jarcento, estas unika skribosistemo, el kiu originis "skriba lingvo", kies evoluoprocezoj ni povas traspuri.

15世紀の韓国の言語圏の中で創製された「訓民正音」またはハングルは、唯一の表記体系であり、そこから「書き言葉」が生まれ、その発展過程を痕跡を通してたどることができます。



### **Fri Ekspozicio de la 102 vizaĝoj**

#### **102 の顔の展示会について**

会場の一階受付の奥に展示されていました。最初に以下のようなことが書かれてました。

**Bonvenon al 102-a Universala Kongreso de Esperanto!**

Mi estas Estro, kiu planis la foto-ekspozicion. Mi unufoje partoprenis en la 98a UK pro la rekomendo de mia edzino. Je la unua tago de UK, mi komencis senconscie foti scenojn, kiuj estis ĝojoplenaj aspektoj renkontiĝi, konversacii, demandi kaj respondi kun sincera mieno en la budo de publika informo en movada foiro.

**第 102 回世界エスペラント大会へようこそ!**

私は、写真—展示会を計画した管理人です。私は妻の推薦によって第 98 回世界大会に初めて参加しました。世界大会の最初の日、運動の祭典の中の公開情報ブースで、誠実な顔つきで、出会ったり、おしゃべりしたり、質問したり、答えたり、というような喜びにあふれている様子の光景を無意識に写真を撮りはじめました。



Pri Ekspozicio de la 102 vizaĝoj  
102 の顔の展示会について



**Solena Fermo**

### 閉会式

29日 10:00-12:00 に開催されました。

会場は大学内のオバマホールです。

来年 2018 年の世界大会はポルトガルのリスボン (Lisbon)、2019 年はフィンランドのラフティ (Lahti)、2020 年はカナダのモントリオール (Montreal) という案内がありました。






世界エスペラント大会終了後に SAT 大会会場へ移動するために、このバスで移動しました。



# La 90-a Kongreso de SAT / 第90回 SAT 大会(ソウル)



Emblemo de SAT  
SAT エンブレム

Hirojuki JOKOJAMA/横山裕之



La 90-a Kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazis de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto en la urbeto Gimpo, apud Seulo, Sud-Koreio. Dum la semajna kongreso 105 kongresanoj el 23 landoj, 6 kontinentoj plene ĝuis liberecan kaj sennaciecan etoson de la kongreso, kiu estis unufoje okazigita en Azio. Ĝi estas la tris SAT-Kongreso ekster Eŭropo post tiu de 1973 en Toronto en Kanado kaj tiu de 1988 en Campos en Brazilo.

SAT (國民性なき全世界協会) の第 90 回大会が、韓国ソウル市の近くの金浦市で、7 月 29 日から 8 月 5 日まで開催されました。1 週間の大会の間に 6 大陸 23 か国から 105 名の参加者が、自由で國民性がない大会の雰囲気を楽しみました。これはアジアで初めて開催されました。ヨーロッパ以外で SAT 大会は 3 回目で、1973 年のカナダのトロント、1988 年のブラジルのカンポス以来です。

La kongreso okazis tuj post la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en la urbo Seulo. Fakte la kongresejo estis la hotelo Yakam Tourist Hotel en banloko de la okcidenta antaŭurbo Gimpo, tujproksime de la bordo de la Flava Maro. Utilis ke kongresejo, loĝado kaj manĝado okazis en la sama loko.

大会は、ソウル市で開催した第 102 回世界エスペラント大会のすぐ後に開催されました。会場は、黄海の海岸にとっても近い金浦市西側にある温泉、ヤガム・ツーリスト・ホテルでした。会場であり、大会 宿泊 会場に利用しました。



Folkloro Vespero en 90-a SAT-Kongreso

第90回 SAT 大会の中で民族の夕べ

La trupo "Espera Mondo", kiu konsistas tute el esperantistoj, aktivadas kaj prezentas koreajn tradiciajn artojn.

歌劇団「エスペラ モンド（希望世界）」は、全員エスペランチストで、韓国の伝統的な芸術の活動をして、紹介をしています。

Tiam la kongresaj partoprenantoj dancas kun ludo de la trupo.

その時、大会参加者は、歌劇団の演奏と一緒に踊りました。

La nomo de danco estas Arirang 아리랑.

踊りの名前は、アラン（아리랑）です。

Datirigota(以下次号)

## La 102a UK kaj la 90a SAT-Kongreso en Seulo

Sawaya Yūiti

Mi partoprenis en la 102a UK (22-29 julio) kaj la 90a SAT-kongreso (29 julio-5 aŭgusto) en Seulo. Estis tiel sufoke varmege kaj humide, ke mi ne emis promeni sur strato kaj mi restis en la kongresejo bone klimatizita.

La 102an UK-on en Seulo partoprenis 1173 esperantistoj el 62 landoj. La kongresejo estis Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj kun luksaj modernaj konstruaĵoj bone ekipitaj per modernaj aparatoj. Mi prezentu miajn impresojn nur pri kelkaj fakaj kunsidoj kaj okazigaĵoj, kiujn mi partoprenis aŭ spektis, ĉar pluraj prelegoj, fakaj kunsidoj kaj eventoj estas paralele samtempe okazigataj en UK.

### <Movada Foriro>

Estas kutimo, ke ĝi okazas en la unua kongrestago vespere. Ĉi-jare ĝi estis okazigita ekstere. Por la unuafojo mi 'spektis' ĝin, en kiu ĉ. 80 landaj asocioj, fakaj esperanto-grupoj prezentis sian agadon per afiŝoj, informiloj, eldonaĵoj ktp. Estis budo de tajvanaj esperantistoj (Ĉi UK-on partoprenis eĉ 12 homoj el Tajvano, kio bone montris la lastatempnan vigecon de Esperanto-movado en Tajvano). En la budo de KAEM vjetnamaj esperantistoj afiŝis pri la 9a Azia Kongreso de Esperanto en Danang en 2019. Nepalaj esperantistoj alvokis partoprenon en la Speciala Ekskurso en Nepalo (26 mar.-8a apr. 2018), ktp, ktp. Estis bedaŭrinde, ke ekpluvis kaj la Movada Forio devis finiĝi pli frue. Mi ne povis viziti ĉiujn budojn kaj rigardi prezentaĵojn.

### <prelegoj>

Min interesis prelego de s-ro Usui Hiroyuki pri lia studo de Kita Ikki kaj Esperanto. Post tiu prelego sekvis prelego de s-ro Kadoya Hidenori, sociolingvistiko, pri Esperanto-movado en Japanio kaj la faŝismemo dum la dua mondmilito el teoria enrigardo al la rilatoj inter "pacismo" kaj la movado. Li akcentis, ke pacamaj esperantistoj devas konsideri kaj lerni frukton de la progresinta ideo "pacismo" el la nuntempa paciologio kaj devas riĉigi kaj konkrete profunde kompreni la ideon kaj la koncepton paco. Se ne, naiva emocia kompreno eblas miskonduki la movadon alidirekten, kiam ili estus en kriza situacio kiel niaj japanaj antaŭuloj. Krome la prelego de d-ro Giridhar Rao (GIRI) impresis min. Li raportis sian praktikon en barata universitato: li ne insruas rekte Esperanton, sed la ideon de la neŭtrala

lingvo Esperanto. En Barato la angla estas oficiala lingvo kaj gepatraj lingvoj estas flanken ŝovitaj kaj ĝenerale tute ne konsiderataj. Sed liaj studentoj post liaj lecionoj pri la ideo de Esperanto ekpensas pri la gepatraj lingvoj kiel neignorebla problemo, li diris. Tia devas esti komuna, serioza kaj tiktla problemo en multaj landoj en Azio kaj Afriko. Estis prelego pri pra-kolonia lingva politiko en Havajo (pri la historio de la havaja lingvo), kiu rememorigis min pri la situacio de la ajnua lingvo.

### <Amikumu>

De ĉi-jara printempo la saĝtelefona *apo* (*aplikaĵo* aŭ komputila programo) Amikumu estis publikita kaj rapide disvastiĝas tutmonde inter esperantistoj. La apo helpas vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn apud vi ĉiam kaj ĉie. Kaj la nombro de la uzantoj superis 7 000. La kreintoj de *Amikumu* estas Richard Delamore (fame konata kiel jutubisto Evildea) kaj Chuck Smith (fama pro Dulingo). Ili fondis la kompanion Amikumu Pty Ltd por evoluigi la *apon* kaj sukcesigi ĝin kiel entreprenon. En la kunsido R. Delamore prezentis unue historion de *Amikumu*, planon evoluigi la Esperantan *apon* kaj poste pluevoluigi ĝin al apo por aliaj lingvokomunumoj. Li montris al la deestantoj la detalan komercan planon kiel entreprenisto kaj alvokis al esperantistoj investon al la kompanio. Mi aĉetis unuafoje saĝtelefonon tuj antaŭ la Seula UK kaj instalis la *apon*. Mi trovis unu esperantiston en la distanco de 20 km for de nia urbo kaj tri esperantistojn en la distanco de 80 km (t.e. en Sapporo). Mi konas aŭ scias du el la tri homoj en Sapporo, sed la aliajn mi ne scias. *Amikumu* montras 100 esperantistojn, kiuj estas plej proksime de la uzanto. Mia saĝtelefonc montris esperantistojn ĝis en Busan, Koreio. Tiam en Busan okazis ILEI-konferenco kaj estis multaj esperantistoj el la tuta mondo. Tre interesa saĝtelefona programo!

### Kino <Plena Rondo>

Mi povis spekti tre interesan kinon produktita de japana profesia reĝisoro Anzi-cool en 2016. Dokumenta filmo 70-minuta pri 70-taga eksperimento ellerni Esperanton fare de la reĝisoro mem, uzante nur senpagajn lernilojn. Aperas multaj intervjuoj al diversaj esperantistoj en la mondo kun anglalingva klarigo kaj subtitolo. Ĝi estis unue prezentita en la lastjara Japana Esperanto-Kongreso (JEK) kaj ĝi refoje estos prezentita en ĉi-jara JEK en Yokohama. Fragmenton el la filmo vi povas vidi: <https://vimeo.com/161531799>

En la UK mi spektis preskaŭ ĉiujn vesperajn eventojn. Mi atendis spekti kaj aŭskulti aparte "realajn" koncertojn de la du Esperanto-muzikaj grupoj 'Kajto' kaj 'Ĵomarto kaj Nataŝa', ĉar antaŭ ĉio iliaj kantoj en Esperanto estas klare aŭdeblas al miaj oreloj kaj al mi tiel plaĉis iliaj belaj kantoj, ke mi aĉetis preskaŭ ĉiujn iliajn kompaktdiskojn. Vere mi povis ĝui iliajn "realajn" koncertojn. Mi hazarde havis ŝancon interparoli kun Nataŝa. Mi diris al ŝi, ke ĉiuj tekstoj kantataj de la grupo 'Ĵomart kaj Nataŝa' tre klare aŭdeblas al japanaj oreloj. Ŝi respondis al mi, ke ili ĉiam ekzercas sin en prononco tiel ke la tekstoj estu klare aŭdebla al ĉiuj. Vere ili estas profesiaj Esperanto-kantistoj, mi komprenis. Krome estis koncertoj de la familia bando Sepa Asorti el Finnlando kaj de Eruda Li el Hongkong, kiujn mi unufoje spektis/aŭskultis. Sepa Asorti funkcias kiel dancmuzika bando, kion bone konis ĉiamuloj de la UK kaj ili tuj ekdancis laŭ la muziko. Eruda Li havas tre belan sopranan voĉon kaj prezentis ĉinajn popolokantojn en Esperanto. Ŝi estas tre flua parolanto de Esperanto.

Rimarkindas, ke la publika kunsido de KAEM estis multekolora: ĉeestis pli ol 70 personoj, 15 reprezentantoj el aziaj landoj raportis pri la agado en sia lando. La sukceson de la kunsido subtenis finance la alvoko pri Azia Karavano 2a. Estis ne malmultaj aziaj junuloj en la UK, kio esperigas nin pri la estonda florado de Esperanto-movado en aziaj landoj.

Ĉu vi konas brazilan aktivulinon Sarah Monteiro? Ŝi estas de tipe tipa gaja kaj energia brazilana karaktero, kiu preskaŭ ne troveblas en japana Esperantujo. Ŝi aktoris kiel Gerda en la filmo "Gerda Malaperis" (filmigo de la samnoma novelo por komencantoj). Mi konatiĝis kun ŝi en la tuttaga kongresa ekskurso al la malnova loka urbo Jonju. En la buso por la ekskurso mi hazarde prenis seĝon apud ŝi kaj havis ŝancon babili kun ŝi. Koreaj komencantoj ofte alvokis al ŝi "Gerda", do ŝi estas tutmonde konata kiel "Gerda" inter komencantoj. Vi povas spekti la filmon "Gerda Malaperis" en YouTube.

<https://www.youtube.com/watch?v=PXjmX2jipQ4>

En la ferma soleno de la 102a UK Mark Fettes, la prezidanto de UEA, oficiale diskonigis la decidon de la estraro pri la sekvaj kongresurboj. Lahti en Finnlando gastigos la kongreson en 2019, kaj Montrealo en Kanado 2020.

\*\*\*      \*\*\*      \*\*\*

La 90an SAT-kongreson partoprenis 105 esperantistoj el 23 landoj. Malgraŭ ke la SAT-kongreso estis okazigita unuafoje en Azio, ĝi sukcesis kolekti pli ol cent partoprenantojn. Ankaŭ mi partoprenis unuafoje en SAT-kongreso. La programeroj de la kongreso estis bone aranĝitaj kaj preparitaj danke al la kolopodoj de LKK. Kvankam la skalo de la kongreso estis dekono de tiu de la UK en Seulo, tamen ni povis havi pli intensivajn horojn por konatiĝi unu kun la alia inter partoprenantoj. Troviĝis nemalmultaj eŭropaj partoprenantoj, kiuj jam ĝuadis etoson de Esperantujo en Koreio: ILEI-konferencon en Busan kaj UK en Seulo.

SAT estas organizo per Esperanto por Esperanto kaj multaj membroj havas grandan intereson pri sociaj problemoj kaj pri praktika uzo de Esperanto en diversaj sociaj kampoj, do la temoj de prelegoj iom diferencas de tiuj de UK, sed ne mankas ankaŭ klerigaj prelegoj samaj kiel tiuj en UK. Fakte mi povis aŭskulti plurajn prelegojn kaj eventojn, kiujn mi ne povis aŭskulti aŭ spekti pro aliaj paralelaj prelegoj aŭ eventoj en la UK.

Min aparte impresis raportoj pri la nuna socia situacio de Kubo, pri tia de Demokrata Kongo post sendependiĝo kaj pri "Kandelrevolucio" en Sud-Koreio (2016-17).

En Kubo plimultiĝis turistoj el Usono kaj turisma industrio multe prosperas. Tio kaŭzis socian fenomenon, ke amase da kuracistoj, profesoroj, ktp forfluis al turisma industrio, ĉar eĉ simpla pordisto de hotelo akiras multe pli multe da mono pro trinkmono donita de turistoj ol la salajro de tiuj cerbolaboristoj. Tio estis granda eraro de politiko, kio skuis la sukcesintan eduk- kaj kurac-sistemojn, kiujn fieris Kubo, sed la salajro de cerbolaboristoj estis altigita kaj tia fenomeno nun malmultiĝis, diris Alberto F. C. Barrios, la ĝenerala sekretario de Esperanto-Asocio de Kubo. Li estis tiel elokventa, ke li flue kaj arde paroladis 30 minutojn sen manuskripto.

Alphonse Waseka Kamango el Kongo (Demokratia Respubliko) raportis pri la nuna situacio de sia lando kaj siaj agadoj. Post la sendependiĝo en 1960 daŭras politikaj tumultoj kaj konfliktoj kaj sociaj sistemoj pri edukado, bonfartoj estas ankoraŭ ne plene establitaj. Oni ne povas adenti la registaron kaj NPO-j faras eblan socian bonfarton por loĝantoj anstataŭ la registaro. Alphonse mem apartenas al tia NPO por entrepreni socian bonfarton: en institucio lia grupo zorgas orfojn kaj tieajn infanojn de malriĉaj familioj kaj eĉ instruas Esperanton al ili kiel gravan parton de ilia edukado, finance helpite ĉefe de eŭropaj espeantistoj. Li alvokis finance helpi tutmonde al la entrepreno.

S-ro Kang Hong raportis pri la Kandel Revolucio de la 29a de oktobro 2016 ĝis la 11a



de marto 2017. S-ro Amelazo Jo profunde analizis la signifon de la revolucio kaj perspektivon pri demokratismo en Koreo. Mi komprenis, ke multaj koreoj fieras la "Kandelrevolucio"-n, ĉar ĝi ŝanĝis politikajn sintenon kaj konscion de la korea popolo por evoluigi demokratian socion.

S-ro Hori Jasuo prelegis pri la nuna stato de Hukusima. Li prezentis ankaŭ sian plej novan libreton "Hajkoj pri la Japana Katastrofo" per deklamado de la originalaj japanaj hajkoj fare de japana esperantisto kaj per voĉlegigo de la esperantigitaj hajkoj al ĉiuj ŝeestantoj.

S-ro Cho Chaiming prelegis pri la internacia politika situacio ĉirkaŭ Tajvano. Mi povis kompreni tre historie tiklan problemon por Tajvananoj, ĉu Tajvano estas parto de Ĉinio aŭ ne. Kvankam li ne menciis la nunan situacion de Honkong, al mi ŝajnas, ke tajvananoj ne kredas la ĉinan principon por solvi la tajvanan problemon "paca unuiĝo kaj unu lando kun du sistemoj", observante la lastatempan situacion de Honkong. Ju pli fortiĝas politika interveno de Ĉinio al Honkongo kaj al la internaciaj rilatoj kun Taivano, des pli fortiĝas la tendenco sendependiĝi ĉe la tajvana flanko. Li malkaŝis, ke en la 8a Azika Kongreso en Quanzhou, Fujiang, Ĉinio, lastjare okazis kvelero koncerne al saluto reprezentanta Tajvanon: la ĉina flanko insistis, ke Tajvano estas nur unu regiono de Ĉinio, do tajvana esperantisto ne rajtas saluti en la inaŭguro kiel reprezentanto de Tajvano. KAEM ne akceptis la insiston kaj li povis saluti en la malferm ceremonio. La ĉinaj esperantistoj apartenantaj al la organizoj, ekzemple, Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), devas sekvi la ŝtatan principon, ĉar ĈEL estas oficiale agnoskita organizo de la ŝtato kaj finance komplete subvenciita, kio estas la plej granda diferenco inter tiu kaj ordinaraj Esperanto-organizoj, al kiuj la membroj pagas kotizon. Mi suspektis, kial ĉina reprezentanto ne raportis la agadon en Ĉinio en la faka kunsido de KAEM en la Seula UK. Sed mi komprenis tion, aŭskultinte lian paroladon, ĉar la nuna rilato inter Ĉinio kaj Koreio estas treege malbona pro la enkonduko de la usona misilsistemon por Defendi Terminalan Alt-altitudan Areon (THAAD/*Terminal High Altitude Area Defense*) en Koreion pro la provokaj agoj (sinsekvaj lanĉoj de misiloj ktp) fare de Nord-Koreio. Ĉinio forte oponas kontraŭ la enkonduko de la plej novan kontraŭmisilan sistemon de la usona armeo en Sud-Koreion, ĉar tio samperpe estas milita minaco al Ĉinio. Kaj la ĉina registaro limigis ĉinojn turismi en Sud-Koreio kaj neniu el ĈEL, Ĉina Radio Internacio kaj El Popola Ĉinio partoprenis en la UK en Seulo. Ĉiuj ĉinaj esperantistoj partoprenintaj en la Seula UK vizitis Sud-Koreion kiel individuoj.

Neil Blonstein el Novjorko raportis sian agadon en Fejsbuko. Li estas konata fajsbukisto en Esperantujo. Lastatempe pli ol 24 000 homoj sukcesis finlerni la tutan Esperanto-kurson de Duolingo, sed evidentas, ke ili ne alvenaas al Esperanto-grupoj aŭtomate. Li opinias, ke novaj esperantistoj volas vidi praktikan uzon de Esperanto. Konsiderante tion, li etendis diversmaniere multajn retajn tentaklojn por 'kapti' ilin kaj fine enkonduki ilin en Esperantujon. Mi tute konsentas lian opinion pri tio. Li prezentis multajn fakajn aktivajn grupojn de esperantistoj en fejsbuko, kiujn li fondis. Hazarde li estis mia kunĉambrano dum la SAT-kongreso kaj povis paroli pri diversaj temoj kun li.

S-ro Miyazawa Naoto estis unu el la LKK-anoj kaj estis elektita kiel unu el la kongresaj prezidantoj kaj prezidis laborkunsidojn kaj aliajn. Krome li faris prelegon kun la titolo "Notoj pri la monda Kapitalismo" el la vidpunkto de globalismo kaj naciismo kiel ŝlosil-vortoj. (Bedaŭrinde mi ne povis rekti aŭkulti lian prelegon pro la paralela kunsido, sed detala enhavo estas en la kongresa libro). En laborkunsido aperis demantoj pri la nuna socia situacio de Japanio. Evidentiĝis, ke absolute mankas bazaj informoj pri la nuna situacio de Japanio.

En diskuto pri okazigo de la dua SAT-kongreso en Azio, japanaj SAT-membroj estis atendataj pri tio. Post forpaso de la antaŭa japana peranto de SAT estis vakua en informado aparte pri engago de la kotizo, kio draste malmultigis japanajn membrojn de SAT. (Krome laŭ mia vido tion ankaŭ povis parte kaŭzi tio, ke maljuniĝo de la membroj progresis/as kiel aliaj japanaj Esperanto-organizoj.) En la kongresa rezolocio estas enskribite, ke la dua SAT-kongreso estu okazigota kiel eble plej frue. Tio estas hejmtasko por japanaj SAT-membroj.

Datrigota

★第31回北海道エスペラント大会 一般公開番組★

講演：「Minoritataj lingvoj kaj minoritatoj kaj mi  
少数言語と少数民族と私  
～ブラジル・エスペランチストからの報告～」(仮題)

講師紹介 (日本語への通訳付き)

マルセロ・ユウジ・ヒモロさん (28歳。現在、札幌市在住)

日系ブラジル人。北海道大学の調和系工学研究室で起業した会社の中で働いているソフトウェア開発者。2013年にサンパウロ大学の情報工学科を卒業。現在は(南フランスの)モンペリエ第三大学で(地域語の)オック語の最終学年生。また、遠隔学習でスペイン国立大学で自然言語からの言語学/コンピュータ処理の学科も卒業予定。



【講師からのメッセージ】私の父方の親戚は、北海道苫前町と秋田県三種町と秋田県能代市の出身です。母方の親戚は、北海道余市町と秋田県能代市の出身です。祖父母の母語は、日本語の東北弁ですが、ブラジルでの複雑な事情と戦争中での抑圧のため、祖父母は私の両親に日本語を教えず、標準日本語も習得していませんでした。そのため、私の両親は東北日本についての詳しい知識はないので、私の母語はブラジル・ポルトガル語となっています。

私は子供の時から、いつも言語に興味を持っていて、北海道北広島市の親戚には大きな影響を受けました。その親戚とコミュニケーションを取るために、その親戚の中の数人が習得しているスペイン語と英語を学び、最終的に日本語を学びました。今、北広島市の親戚とは日本語で会話しています。

2001年には少数言語に興味を持ち、その数年後に人工語に興味を持ちました。少数民族と関係する知人の多くの方がエスペランチストであったため、2008年からエスペラントを学びましたが、色々な理由で中断しました。2013年の冬休みに、また言語を学ぶことにしました。私は、インターネットで言語を使っている世代に属しており、(ネットでの学習講座の)Lemu!(レルヌ!)でエスペラントを学び、フィリピン人の言語援助をしてくれる人がいます。ブラジルで育ちながら、子供の時分には、いつも自分の日本人らしさを否定していました。私は地域の多数派の文化に合わせようとしていこうと試みましたが無駄でした。一方、私も自分に日本を感じませんでした。少年時代には、私は少数者の言葉の意味を全く知りませんでした。しかし、色々な少数民族を知り始めた後には、少数者としての自分に出会いました。ブラジルでの差別を話すことはタブーです。黒人は既に長い間差別と闘ってきましたが、最近までアジア人はいつも沈黙し、現状について自己満足に陥っていました。グローバル化し、変化している世界において、アイデンティティはますます複雑となり、そのテーマを話すことは、私にとって重要になります。

エスペラント:言語を異にする民族間の「橋渡し」のために考案された国際共通補助語です。この言語が、「じゅうぶんに実用できる言語」であることを、講師のユウジさんが実証してくれます。

とき・ところ：2017年10月22日(日)9:00~12:00

かでの2.7(中央区北2条西7丁目)1020会議室

入場無料! 事前申し込み不要!(直接会場へお越しください)

お問合せは:北海道エスペラント連盟

011-790-8056(後藤)または hokkaido\_esp\_ligo@yahoo.co.jp(横山)までどうぞ。

エスペラント 北海道

検索

ユウジさんからのメッセージの原文です。

Saluton. Mi nomiĝas Yuji, mi estas 28 jaraĝa kaj estas japana brazilano. Mi nune loĝas en Sapporo kaj laboras kiel softvara disvolvisto en ekfirmo de la laboratorio de Inĝenierio de Harmoniaj Sistemoj de la Hokkajda Universitato. Mi diplomiĝis pri Komputiko de la Universitato de São Paulo en 2013. Nune, mi estas lastjara studento pri la okcitana lingvo en la Universitato de Montpeljero III kaj ankaŭ magistrigas pri Lingvistiko/Komputila Prilaboro de Naturaj Lingvoj en la Hispana Nacia Universitato de Jedistanca Edukado. こんにちは。私は、ユウジという名前で、28歳で、日系ブラジル人です。現在、札幌市に住んでいて、北海道大学の調和系工学研究室で起業した会社の中でソフトウェア開発者として働いています。2013年にサンパウロ大学の情報工学科を卒業しました。現在は(南フランスの)モンペリエ第三大学で(少数言語の)オック語の最終学年生です。また、遠隔学習でスペイン国立大学で自然言語からの言語学/コンピュータ処理の学科も卒業します。

Mia patra familio eldevenas el la urbo Tomamae (Hokkajdo) kaj la urboj Mitane kaj Noŝiro (Akita). Mia patrina familio, el la urboj Jojŝi (Hokkajdo) kaj Noŝiro (Akita). La denaska lingvo de miaj geavoj estis la nordorienta japana, sed pro sia komplika situacio en Brazilo kaj la subpremo dum la milito, ili nek instruis la japanan al miaj gepatroj nek majstris la norman japanan. Konsekvence, miaj gepatroj nur havas pasivajn konojn pri la nordorienta japana, kaj pro tial mia denaska lingvo estas la brazila portugala. 私の父方の親戚は、苫前町(北海道)と三種町(秋田県)の出身です。母方の親戚は、余市町(北海道)と能代市(秋田県)の出身です。祖父母の母語は、日本語の東北弁ですが、ブラジルでの複雑な事情と戦争中の抑圧のため、彼らは私の両親に日本語を教えず、標準日本語も習得していませんでした。そのため、私の両親は東北日本についての詳しい知識はないので、私の母語はブラジル・ポルトガル語です。

De kiam mi estis infano, mi ĉiam interesigis pri lingvoj. La plej grava influo ja estis miaj parencoj en la urbo Kitahiroŝima. Pro la ideo interkomuniki kun ili, dum mia infaneco kaj plenkreskiĝo, mi lernis la hispanan kaj la anglan (du lingvojn, kiujn kelkaj el ili majstris), kaj finfine la japanan. Hodiaŭe, kvankam, ni nur interparolas japane.

私は子供の時から、いつも言語に興味を持っていました。最も大きな影響は、北広島市の親戚でした。このも時代に始まる成長の年代に、彼らと話し合えるようになろうと思い、その親戚の中の数人が習得しているスペイン語と英語を学び、最終的に日本語を学びました。今、北広島市の親戚とは日本語で会話しています。

En 2001, mi ekinterestigis pri minoritataj lingvoj. Kelkaj jaroj poste, mi ekinterestigis pri artefaritaj lingvoj. Ĉar multaj el miaj minoritat-rlitaj kontaktoj estis geesperantistoj, mi eklernis Esperanton en 2008, sed tuj haltis pro diversaj kialoj. Dum miaj vinteraj ferioj en 2013, mi decidis lerni definitive la lingvon. Mi alpartenas al la generacio kiu esperantiĝis kaj uzas la lingvon ĉefe interrete. Mi lernis E-on pere de Lernu! kaj havis lingvohelpanto el Filipinoj. 2001年に私は少数言語に興味を持ちました。数年後に私は人工語に興味を持ちました。少数民族と関係する知人の多くの方がエスペ란ティストであったため、2008年にエスペラントを学び始めました。しかし、色々な理由ですぐに中断しました。2013年の冬休みに私は最終的に言語を学ぶことを決めました。私は、エスペラントをして、主にインターネットで言語を使っている世代に属しています。私は(ネットでの学習講座)Lernu!でエスペラントを学び、フィリピン人の言語援助をしてくれる人がいます。

Kreskante en Brazilo, dum mia infaneco mi ĉiam neis mian japanecon. Mi provis sensukcese konformiĝi kun la plimulta loka kulturo. Aliflanke, mi ankaŭ ne sentas min japano. Tiam mi tute ne sciis la signifon de la vorto minoritato, sed post kiam mi ekkonis pri diversaj minoritataj popoloj, mi ekrekonis min kiel minoritato. Paroli pri diskriminacio en Brazilo estas tabuo. Nigruloj jam delonge batalas kontraŭ diskriminacio, sed ĝis lastatempe azianoj ĉiam estis silentaj kaj memkontentaj pri tio. En tutmondiĝanta kaj ŝanĝanta mondo, identecoj iĝas pli kaj pli kompleksaj, kaj laŭ mi, ja gravas paroli pri tiu temo.

ブラジルで育ちながら、私の子供時代には、いつも自分の日本人らしさを否定していました。私は地域の多数派の文化に合わせていこうと試みましたが無駄でした。一方、私も自分に日本を感じません。少年時代には、私は少数者の言葉の意味を全く知りませんでした。しかし、色々な少数民族を知り始めた後には、少数者としての自分に出会いました。ブラジルでの差別を話すことはタブーです。黒人は既に長い間差別と闘ってきましたが、最近までアジア人はいつも沈黙し、現状について自己満足に陥っていました。グローバル化し、変化している世界において、アイデンティティーは段々と複雑となり、私にとって、そのテーマを話すことは重要になります。

Amike,

親愛なるあなたへ

\* *MajStono* 2017 julio, n-ro 282, 仙台エスペラント会, B5X8 頁のうち E 文 2 頁半。巻頭に Verda KUnioĝado (7 月) 関係記事: La 37-a Kunloĝado okazis/Imazumi, La latero el Fanjo post la Kunloĝado, Fotoj, Kasitaj aferoj de la kunloĝado/red., 受領機関誌紹介では Heroldo de HEL N-ro 172 の合宿記事 (JEI 検定試験) に言及。仙台で 7 月実施した試験と同じ出題もあったらしい。

\* *Ponteto* (Bulteno de Esperanto-Ligo en Regiono Kantoo) Julio 2017, n-ro 283 B5x24 頁のうち E 文 8 ページは「論語世界語訳/佐々木爾央」と「Leteroj de Tigro: Okcidento kaj Oriento/Tigro」。巻頭記事は「第 66 回関東エスペラント大会終了・豪華な内容の大会だったが、先行きに大きな不安」。「堀さんの気ままエッセー 32・香港へ行く」、「地方会の活動とメディアへの露出/引田秋生」。

\* 受講生通達: 第 173 号、2017-08-01, 沼津エスペラント会, A4X12 頁のうちエスペラント文 3 頁。「催しもの」欄に 10 月の北海道 E 大会。「お便りから」欄には星田淳からの、むかし国連に E 文の読願文を出し受け付けられたことも。

\* *La Movado*: 関西エスペラント連盟 (KLEG) 発行, N-ro 798, Aŭgusto 2017; B5x20 頁のうち E 文 4 頁。Kajero *Libervola* は "Bitlibro/YAMAGUTI Sin'iti", 「モバード俳句 (53)/広高正昭」ではブルガリア人の作品も紹介。書評: El la "Verda Biblio"/伊藤俊彦, 「第 66 回東海 E 大会報告/堀田裕彦」, 「片岡忠さんを悼む/菊島和子」。

\* *NOVA VOJO* : N-ro 542 aŭ-

gusto/septembro 2017, EPA (エスペラント普及会), A5X34 頁のうち E 文 2 頁。巻頭言「ソウル UK 参加の大きな成果/奥脇俊臣」に続いて同大会参加報告、裏表紙含む 2 頁にわたる写真入り報告、と UK 記事が多い。「エスペラント朗詠短歌通信添削/前田茂樹」はこの号で 10 回目。丁寧な解説は変わらない。

\* *La Movado*: 関西エスペラント連盟 (KLEG) 発行, N-ro 799, septembro 2017; B5x16 頁のうち E 文 5 頁半巻頭記事「峰芳隆さん (6 月他界) の足跡をたどって/編集部」と 2 頁半に及ぶ「峰芳隆さん追悼」の文。

Kajero *Libervola* "Serĉi originilon/HIROTAKA Masaaki" は 1931 年 Kaloczyay が発表した E 訳俳句の原作推定。連載中の "Mi mortis Tiamaniere!/私はいかにして死んだ!/平林初之輔, trad:belmonto" は 8 回目の今号で終わり。

\* *La Suno* N-ro 105, 山梨エスペラント会機関誌, 2017 年 9 月 1 日, B5X20 頁のうち E 文 8 ページ半は連載中の "Emilo kaj la Detektivoj/エーミールと少年探偵団: de Erich KÄSTNER, de la germana Esp-igita de 工藤尚" と "Aliaj Genepoj---Hirundoj/HIKITA Akio", "Partoprenante internacian eventon, Himalaja Renkontiĝo en Marto (国際企画、ヒマラヤ・レンコンティジョに参加して)/Futatsugi Tooru" の 3 編。

日本語記事: 山梨 E 会の活動から/長澤精子, Skype の E 語勉強会に参加して/藤田喜久, 山梨日日新聞社タウン企画情報誌「カワセミ」との出会い/横山裕子, 山梨放送『ててて! TV』への出演/引田秋生 など。マスコミへの露出が目される。

\* Novaĵoj Tamtamas; n-ro 329/  
Septembro 2017, Internacia Gaze-  
to de Esperanto Jokohama (Hama-  
-Rondo), A4X4 頁、エスペラント文。  
ソウル UK の写真入り記事、9 月の  
教科書展示予告。Esec 欄に“La  
Usonaj Militaj Instalaĵoj en Jo-  
Kohamo/Tanigawa Hirosi”は横浜

の米軍基地について。

\* La Tamtamo; 第 501 号、2017 年  
9 月号、NPO 法人エスペラントよこは  
ま会報。A4X10 頁、日本文。よこは  
ま国際フェスタ(10 月)、日本 E 大会  
(11 月、横浜)、など予告記事、世界  
基盤の報告など。  
大会

## 2017 エルプラまつり参加報告

9月9日(土) 10時から15時まで札幌エルプラザで、今  
年も、エルプラまつりが開かれました。

日頃、エルプラザを利用して活動している市民活動団体や一般  
サークル団体がこの時とばかり、色々工夫して、集まった市民に  
発表します。今年は、62団体が参加しました。

我が北海道エスペラント連盟も3階和室に所狭しと、本やテキ  
ストを並べ、大きなパネル2枚の裏表には、7月に韓国で行われ  
たUKや、SATの大会の写真と説明文(星田さんと横山さん提供)  
を展示しました。また、テキストを拡大したものをパネルに貼り、  
興味を示した人には、ミニ講座も行いました。

来場者、35人は、午後に集中して来られたので、一時は、  
お客がぶつかり合う程の盛況ぶりでした。パンフレットを持ち帰  
った人も多かったです。

エルプラザの入り口では、JEIで買った緑色の「エスペラント  
語はじめてみませんか?」のパンフレットに「3階和室へどうぞ」  
と書いて200枚配りました。

和室前での金森さんのお猿の人形を使った呼び込みや阿部さ  
んのエスペラント雑誌を見せながらの呼びかけも功を奏したも  
のと思います。お手伝い下さった皆様、Koran dankon!!!

○ 当日のスタッフ: 後藤(義)、阿部、横山、白濱、 柳、山岸、  
川合、金森、山下、後藤(純) 計10名

(文責: 後藤純子)

Protokolo de la 5-a Komitato Kunsido de HEL/Kasjaro 2017  
2017年度 第5回北海道エスペラント連盟委員会 議事録

- 日時：2017年7月16日（日） 13:00～14:00
- 場所：札幌エルプラザ2階 会議コーナー18人用
- 出席者：星田[司会]、後藤（義）、阿部、山下、川合、後藤（純）[記録]  
（欠席：横山）

[組織] (川合)

- ・入会1（柴田真吾さん）、正会員26、家族1、購読9、青年2、特別2、  
（会員数40名）

[財政] (阿部)

- ・予算は、順調に執行している。

[広報] (横山：欠席のため、後日、電話で報告)

- ・HP：アクセス数75,810件（2ヶ月前比+202）
- ・メールマガジン：前回報告した第172号から発行していない。RO誌で担  
当している「ことばの質問箱」の記事をRO掲載後に転載予定。

[情報・宣伝]

- ・5/26北海道新聞夕刊「情報ランド」の頁に「エスペラント入門講座」の  
案内が掲載された。「ポーランドの眼科医が創案した国際共通語「エスペラ  
ント」を学ぶ2日間の入門講座。ゲーム等も楽しめる」と。

[教育・研究]

- ・札幌E会：土曜例会では、T. Sekel著“GAMBO RAFIKI”を読んでいる。後  
半は、会話。（後藤）
- ・苫小牧E会：入門講座：1名、輪読は“Kredu min, sinjorino”を読ん  
でいる。（2人-内1人は病気欠席中）

[機関誌] (星田)

7月16日、Heroldo de HEL 第172号（24頁）、80部発行。

[年間計画]

- ・エルプラまつり：9月9日、事前ミーティング出席者：7/19（後藤純子）、  
8/20（後藤義治）。エルプラまつり当日は世界大会参加者の情報を展示予  
定。

・北海道大会(10/21~22)議案書の原稿締め切り-8月末迄に各委員は、星田さんに原稿(A4判)を送る。参加費は千円。不在参加費も同じ。

・公開講演会の講師予定者、マルセロ・ユウジさんに講演内容を連絡してもらおうよう、横山さんから依頼してもらおう。講演についてのチラシを作成して、エルプラまつりで配布(川合さん)。

[次回委員会]

9月17日(日)13時より。場所:札幌エルプラザ2階会議コーナー(18人用)、同日10時より機関誌と大会議案書の印刷を行う。

以上

\*\*\*\*\*

[編集後記/Redaktanto parolas .....]

\*ソウルのUK(UEAの世界大会)とアジアではじめてのSAT世界大会について横山さん、澤谷さんから長文の寄稿。全部入れると30ページ近くになりそうなので一部を Daŭrigota(以下次号)としてしのぎました。

\*\*\*\*\*

北海道エスペラント連盟 会費/年

正会員 3000円、青年会員(26歳未満) 1500円、  
購読会員 2000円、家族会員、失業者など割引 1000円

HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO

\*Redaktas la Organo Fakto de HEL

c^e HOS^IDA Acus^i

Miyanomori 2-18-18, TOMAKOMAI

053-0844 JAPANIO

TEL-FAKS:0144-74-2539

Retadreso:hosidaacusi@kir.biglobe.ne.jp

\*Sekretario: KAWAI Yuka

\*事務局:川合由香

N-ro 100, Simin-Katudo-Sapoto-Senta

〒060-0808 札幌市北区

Sapporo L-Plaza 2F, Kita 8 Nisi 3

北8条西3丁目札幌エルプラザ

Kita-ku, Sapporo, 060-0808 Japanio

市民活動センター 1階No.100

TEL-FAKS:0123-88-3752

Retadreo: kunespere@olive.plala.or.jp

\*TTT-ejo : http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jp/index/index-j.htm

\*Postg^irkonto (郵便振替) : 02700-6-17075